

La babiladaj rondoj okazas vendrede je la 19a horo.

La gastigonto informas pri sia decido pri la manĝo pere de la komentario en Doodle. La partoprenantoj aliĝas samloke kaj povas komentaĵe informi ĉiujn - kelkajn togojn antaŭe - pri tio, kion ili alportos.

Kiam ĝi okazas ĉe Espace Dickens, ĉiuj pagas ion por la luado de la salono.

"Ambaŭa grupo" : vendrede, la 24-an de februaro, Marie-Antoinette kaj Knud invitas nin ĉe Espace Dickens. Unu monaton poste, vendrede, la 24-an de marto invitos nin Rosario, samloken.

"Okcidenta" :

ve, la 17-an de marto

ĉe François Randin
ch. de la Vallombreuse 14, Lausanne
021 647 29 28 / 076 411 14 55



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd>

"Orienta" :

ve, la 10-an de marto

ĉe Marie-Antoinette kaj Knud Sunier
av. des Alpes 150, Montreux,
021 961 28 56



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6>

Bazaro: Ĉijare la partoprenantoj de la asembleo decidis propagandi por esperanto, dusabate monate, sur la place de La Palud en Laŭzano. Aliĝu al:

<http://doodle.com/poll/6hgpagnb58it434>

Laŭzana Esperanto - Societo

ĉe F. Randin - ch. de Valombreuse 14 * CH - 1004 LAUSANNE

+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

www.facebook.com/societedesperanto.lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc
Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 -

Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Informilo

marto 2017 - n° 03

Lunde, la 6-an de marto je la 20-a
kunsido ĉe Espace Dickens en Laŭzano.

**Karlota kaj Toos rakontos
al ni sian novjaran feston
en Germanio**

LUMINESK' estas la nomo de la silvestra Esperanto-renkontiĝo organizata de Germana Esperanto-Asocio de la 28-a de decembro 2016 ĝis la 04-a de januaro 2017 en Kleve - Germanio.

Lunde, la 3-an de aprilo

Diskuto pri "falsaj amikoj" en esperanto (paronimoj).

Lunde, la 1-an de majo

Decidota

Sabate, la 17-an de junio

Ekskurso al muzeoj en Fribourg

Impertinenta difino

Horoskopo : Dokumento konsultata de la politikestroj, kiam ili devas elekti gravajn decidojn pri la estonteco de la nacio.
Kiam la decido estas malpli grava, ili konsultas la parlamenton.
Kiam estas sengraveca, ili konsultas la popolon.

Définitions impertinentes, Edouard Huguélet
Esperantigita de KS

Laŭzana Esperanto-Societo

Lundaj renkontiĝoj: dum la pasinta ĝenerala asembleo, la ĉeestantoj decidis, ke la membroj pagos po CHF 5.- (luado de la salono) por partopreni la kunsidon.

Ĝenevaj kunsidoj : La membroj de LES partoprenos la renkontiĝojn de "La Stelo" en Ĝenevo. Ni informas vin, ke la venonta "Kasta-Festo" okazos la 4-an de marto ekde la 18-a, rue de Montbrillant 20, îlot 13. (<http://lastelo.ch/evenements>)

Festo en Martigny : "Le Festival des 5 continents" okazos vendrede, la 23-an kaj sabate, 24-an de junio inter la 10-a kaj la 18-an en la romana urbo. La komitato decidis partopreni tiun feston per nia bazarbuda tendo. Bonvolu anonci vin kiel deĵoranto, matene aŭ posttagmeze ... aŭ ambaŭ, al nia sekretario (076 411 14 55). (<http://www.5continents.ch>)



Solvo de la kalkulludo de la pasinta informilo

Ĉu vi pensis pri la demando de la pasinta informilo ? Ĉu vi trovis la solvon ? Aŭ ĉu vi proponas proksimuman nombron ?

Ni rigardu kune !

Kutime oni donas la 9 kartojn po tri al ĉiu partoprenanto. Sed por kalkuli, oni povas imagi, ke oni donas al la unua 9 kartojn inter la 36, kaj 9 kartojn al la dua inter la 27 ceteraj karto, kaj finfine 9 kartojn al la tria inter la 18 ceteraj. La kvara ricevas la 9 lastajn kartojn. La rezulto estos sama.

Laŭ matematiko, oni uzas formulon, kiu nomiĝas "kombinaĵoj", kiu estas $x \text{ (ikso)} = N! / (R! * (N-R) !)$

Oni nomas $N!$ "N faktorialo", signifante, ke oni obligas $1 \times 2 \times 3 \times \dots \times N$. N estas la nombro de karto en la ludo; R , la nombro de karto, kiujn la ludanto ricevas.

Do, la unua ludanto povas ricevi 94'143'280 malsamajn ludojn.

La dua povas ricevi 4'686'825 malsamajn ludojn inter la 27 ceteraj karto.

La tria povas ricevi 48'620 malsamajn ludojn inter la 18 ceteraj. Kompreneble, la kvara ricevas la soldon (nur unu eblecon).



Kaj pro ĉiu kombinaĵo de la unua ludanto, la dua povas ricevi la 4'686'825 eblecojn, kaj por tiu la tria ankoraŭ povas ricevi 48'620 eblecojn. Do la tutaj eblecoj estas $94'143'280 \times 4'686'825 \times 48'620$.

Tiu nombro estas $2,145 \cdot 10^{19}$. Tiu signifas 2.145 antaŭ 16 nuloj. Oni ne povas imagi, kion ĝi signifas.

Nun pensu, ke la universo aĝas, laŭ la scienculoj, 15 miliardojn da jaroj (daŭro, kiun ankoraŭ oni ne povas imagi !).

Se oni volus uzi ĉiujn eblecojn por niaj kvar ludantoj dum tiu tempo oni devus disdoni la kartojn 45foje en ĉiu sekundo...

Estas nekredeble pensi - sed estas vere - ke nur 36 karto povas proponi tiom da eblecoj... Ĉu vi imagis tion ??

Vidante tion, oni povas pensi al la eblecoj de la viva mondo, en kiu kelkaj etaj diferencoj en la komplekseco de niaj genoj permesas krei senfine ĉiun malsaman ulon.

Tio donas vertiĝon, kaj ankaŭ miregon.

Knud Sunier